

Praha-ek-1956-39_40-01

No 39-40

Julio - Aŭgusto

Aperas laŭbezone.

Komence de julio aperos duebla numero por la monatoj julio – aŭgusto 1956.

HILDA D R E S E N /Tallin/: DUM FLORADAS LA SIRINGO.

Dum floradas la siringo,
ĉio ŝajnas por atingo
tiel simpla kaj facila.

Ilin la aŭtun' forigas,
ree revi nin instigas
per multkolorco brila.

Dum finfloras la tilio
kaj finiĝas jam julio,
kor' fariĝas maltrankvila.

Dum ekflagras la aceroj
kaj ekruĝas sorpoberoj,
regajiĝas kor' sopira,

Kiel surĉiele nuboj,
ekaperas are duboj
en la koro senkonsila.

dum la foliar' ekflavas,
ree la mirakloj ravas
koron per magi altira.

E u g é n i e C O T T O N ,
Prezidantino de Internacia Federacio de Demokrataj Virinoj,
Vicprezidantino de Tutmonda Pac-Konsilantaro,

dum la kongreso de Internacia Federacio de Demokrataj virinoj 1947 en Praha esprimis la deziron diri kelkajn vortojn en la mikrofonon de la Esperanto-dissendoj. K-do Tosek, la tiama ĉefo de la fremdlingvaj dissendoj, sciigis tion al la Esperanto-parolistoj kaj disponigis al ili aŭtomobilon kun magnetofon. La Esperanto-parolisto kaj tradukisto Jaroslav M a ř í k anoncis sin en la kongresem /palaco de la estinta Senato/ al s-ino E. Cotton la 23-an de februaro 1947. S-ino Cotton akceptis lin rapide kaj senkulpigis sin petante, ke la intervjuanto iom atendu. Poste ŝi sendis al li tiun ĉi france skribitan kaj de ŝi subskribitan Saigon /la vizito de la intervjuanto okazis dum la kongresa traktado/:

„Je serais reconnaissante à Monsieur... Esperantiste de bien vouloir d'abord m'excuser pour la brusquerie de mon l'accueil, ensuite de me donner son nom,

Ensuite de bien vouloir traduire la page ci-jointe que je pourrai essayer de prononcer à la Radio.

Compliments les meilleurs

E Cotton /p.m./.

Ĉe tiu sciigo estis almetita krajone skribita paĝo de franca teksto. La intervjuanto tradukis la francan tekston en Esperanton kaj kiam s-ino Cotton povis Liberci por iom da tempo, li instruis al ŝi la

ĝustan elparolon de la Esperanto teksto. Post du provoj s-ino Cotton diris en la mikrofonon sian esperantlingvan mesaĝon. Radio Praha elsendis ĝin en la sama tago per mallongaj ondoj kaj ripetis ĝin samsemajne per la meza ondo 470 m.

Jen estas la originala franca teksto de la mesaĝo de Eugénie Cotton: „L'emploi d'une langue auxiliaire internationale serait de la plus grande utilité dans tous les Congrès internationaux. Dans ces Congrès on admet en plus 4 langues officielles et sur 40 pays associés, une vingtaine sont obligés d'apprendre une langue officielle pour se faire comprendre d'une partie de l'auditoire seulement, alors qu'en apprenant une langue facile comme l'espéranto tout le monde se comprendrait.

Je souhaite que quelques femmes de pays variés présentent la résolution d'apprendre l'espéranto et qu'elles fassent la prise en un prochain Congrès qu'on peut dire à se comprendre. On renforcera ainsi l'amitié entre les femmes du monde entier qui est une de nos ambitions les plus chères.“

Mi deklaras, ke la supra franclingva teksto estas laŭvorte identa kun la originalo, kiu troviĝas en mia posedo. Mi aldonas, ke s-ino Cotton rakontis al mi pri sia edzo, la fama franca fizikisto kaj granda esperantisto, Aimé Cotton.

Jaroslav Mařík

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkách 26 je la 20-a horo.

Programo:

- 4.7. Ni lega sel belaj kaj interesaj libroj...
- 11.7. Eva Suchardová: Historio de la ĉeĥa teatro.
- 18.7. Ni lega sel esperantaj gazetoj kaj revue...
- 25.7. Ni legas el la leterojde niaj korespondantoj...
- 1.8. Antonín Seemann-Eva Suchardová: Kiel ni ludis teatron dum la milito.
- 8.8. Antonín Slanina-Josef Vítek: Nunjaraj travivaĵoj en Doksy.
- 15.8. Jaroslav Mařík-Vuk Echtner: Somera Esperantista Tendaro de Junularo.
- 22.8. Dolfa Bartošík: Ĉu estas necese konservi esperantaĵojn?
- 29.8. Jaroslav Hebký: Rememoroj el mia mondmigrado /II-a parto/.
- 5.9. Josef Vítek: Universala Kongreso en Kopenhago.
- 12.9. D-ro Jaromír Jermář: Ĉe balkanlandaj esperantistoj.

NIAJ MEMBROJ KAJ AMIKOJ.

OTA GINZ SESDEKJARA,

li naskiĝis la 19-an de julio 1896 en Ždánice kaj de post 1918 estas aktiva en diversaj sferoj de nia movado. Fari liston de liaj aktivech estas preskaŭ neeble, ĝi estus tro longa kaj krome multaj liaj rezultuj tre elstarantaj el serio.

Baldaŭ li kreis en la Asocio gazetaran servon. Jam en 1920. Ĝi konsistis en verkado de ĉeĥaj artikoloj, kiuj estis ciklostilite sendataj al areto de kunlaborantoj, kiuj devis prezenti kopiojn al redakcioj de ili priservataj. Similaj artikoloj estis de Ginz publikigataj dum 1923 – 34 en La Progreso kaj represitaj aŭ kopiitaj sendataj al redakcioj. Multaj aperadis. Ginz raportadis resume pri ili sub la titolo „Kion oni skribas pri ni“ citante la elstarajn artikolojn. Natura sekvo estis, ke la ĉs. gazetoj pli volonte akceptadis materialojn liveratajn ankaŭ de kontribuantoj tute memstaraj. Estas edifanta sperto relegi nun post jardekoj tiujn ĉi kontribuantojn. Ankaŭ tiujn en la Bulteno de ĈAE, kie li resume

raportas pri artikoloj en ĉs. gazetararo. Statistiko de li kompilata dum multaj jaroj enhavas imponajn nombrojn. En 1932 aperis 1080 artikoloj en 227 gazetoj, en 1936 estas tiuj ĉi ciferoj 2150 artikoloj kaj 325 gazetoj.

Libroj de li publikigitaj: Radio-amatora Vortaro kvinlingva /1927/, ĉeĥa per-esperanta traduko de la origine norvega verk de Odd Arnesen Per aerŝipo al la Norada Poluso /1929/, Ĉeĥoslovaka Antologio /kun Kamarýt, 1935/. En 1936 li tradukis ĉeĥen la verkon de la franca inĝeniero Aisberg „Fine mi komprenas la Radion“ kaj estis lia ideo iniciati ĝian tradukon ankaŭ en aliaj lingvoj. Tiel okazis, ke tiu ĉi verko, tre originala laŭ la klariga metodo, aperis en 13 lingvoj. En 1950 – 1956 li sisteme tradukas ĉeĥajn literaturaĵojn kaj disponigas esperant-lingvajn manuskriptojn al esp-istoj ĉinaj kaj japanaj, kiuj verkas laŭ ili tradukojn, kiuj jam aperis pluraj.

Dum pli ol du jardekoj li estis UEA-delegito en Praha, kaj plenumis longan vicon da servoj. Aŭdi rakontadon pri ili signifus aŭskulti historietojn aventurajn. Ginz aperas kiel ĉiufaka specialisto. Por montri la diversecon de lia intereso ni nomu por ekzemplo du: Andersen-muzeo en Danlando, al kiu li regule liveras ĉiujn ĉeĥajn aĵojn pri la fama fabelisto, kaj persekutado pri misuzo de ĉs. patento por fermi la botelojn de soda-akvoj, kiu valore helpis al la patentposedanto.

Sed tiu nelacigebla laboranto ankaŭ staris seninterrompe en organizaj vicoj. Estas lia merito, ke la Asocio akiris oficejon, kie laboris profesiaj oficistoj. Estas lia merito, ke finfine en 1938 la Asocio akiris ejojn en Truhlářská strato. Sed ankoraŭ pli dankinda estas lia persistemo, kun kiu li persekutis la librovendejan koncesion por la Asocio, ĝis ni akiris ĝin kaj komencis la 1-an de januaro 1938 regulan komercon pri libroj kaj libroeldonan entreprenon kiel regula membro de Librovendista gildo.

Estas malfacile fari liston de Ginz-faroj kompleta. Tamen ni enskribu, ke li estis la unua estro de la Asocia Radio-komisiono, ke li trovis tempon eĉ por E-filatelito. Stacidomaj tabuloj dum 1933-1938 estas lia iniciato kun rimarkinda rezulto. Same lia iniciato en 1954 „E.en telefonlibrojn!“ akiris bonan resonon.

Profesie li estis teknika oficisto, plurfoje sur gvidaj postenoj. Dum la milito unu jaron en koncentrejo. Perdis filon. Revenis ne rozpita. Kiam lia filino elmigris Izraelon, kie ŝi vivas kiel kontenta edzino kaj patrino, li dum pluraj jaroj petis pri permeso elmigri. Tion li sukcesis la 24-an de marto 1956, ekvojaĝante kun sia edzino tra Vieno kaj Genova al Shd. H. Szold 11 Kirjat Jam B. en Izraelo. Ili estis amike akceptitaj de sia nova patrujo kaj ni sendas a lili vardajn salutojn. Nek samideano Ginz nek lia edzino sidos tie senlabore.

Stan. Kamarýt

D-ro Pravoslav SÁDLO-PÁV. Al tiu ĉi numero ni aldonas prospekton de tiu ĉi nia klubano. Ni petas eksterlandajn legantojn transdoni ĝin al koncetragejoj. Enlandajn legantojn ni petas sendi ĝin al siaj eksterlandaj korespondantoj kun la sama peto aŭ transdoni la prospekton al siaj lokaj kulturasocioj. Redakcioj de esperantaj gazetoj kaj revue estas petataj recenzi la prospekton en siaj organoj. Ni atentigas, ke estu eble uzi ĉeeston de s-no Sádlo en eksterlando por esperanta propagando, ĉar li regas perfekte nian lingvon!

... salutojn sendis...

s-ano Géza Novotný el Moskvo...

s-ano D-ro Jaromír Jermář kun hungaraj samideanoj el Budapeŝto...

s-ano Eduard V. Tvarožek kaj Ing. Štefan Veselý kun polaj samideanoj el Varsovio...

Elkorajn salutojn al ĉiuj! Iliaj rememoroj tre ĝojis nin!

Dum la kongreso de bulgaraj esperantistoj en Sofio oficiale reprezentas ĉeĥoslovakon esperantistaron komitatano de TKKE nia membro Dro J. Jermář.

- VIZITIS NIN -

HUNGARA samideano L. Kapitány el Dunakeszi kun du amikoj venis la 12-an de junio. Kelkaj rapide kunvokitaj gesamideanoj el Praha kaj s-ano Josef Kožený el Kutná Hora pasigis kun ili agrablan posttagmezon kaj vesperon. Sekvantan vesperon s-ano Kapitany vizitis kunvenon de nia Klubo, kie li faris mallongan paroladon en lastaj minutoj antaŭ sia forveturo.

ĈINA samideano, Ivan Ho, oficiala reprezentanto kaj gvidanto de ĉina delegacio al Blindula Spartakiado en Praha – mem blindulo vizitis nian kunvenon kaj faris mallongan paroladon.

FINNLANDANINO Salí Viikkí, filino de ĉefdelegito de UEA en Somero kun tri geamikoj venis automobile al Praha. Kun jarlibro en la mano ŝi el serĉis nian ĉefdelegiton s-anon Ŝustr, kiu rapide kunvokis kelkajn niajn membrán, kiuj masigis kun maloftaj gastoj agrablajn horojn de ilia ne longa restado en Praha.

Ĉina samideano Hujucz el Pekino, membro de la ĉina parlamento, komitatano de la Mondpaca Konsilantaro, membro de la socio por enkonduko de latinskribo, komitatano de Ĉina Esperanto-Asocio survoje el Parizo haltis en nia ĉefurbo, elserĉis la ĉefdelegiton, traktis kun li kaj la prezidanto de TKKE pri reaktivigo de Ĉina Esp.Asocio, kies laboro de neniŭ estas bremsata. Bela dimanĉa posttagmezo estis dediĉita al similaj temoj kun pluraj gesamideanoj en la parko de Petřín. Marde la 26-an de junio la tre simpatia gasto daŭrigis fluge al Moskvo por viziti s-ano Bokarev kaj poste al Pekino.

- VIZITOS NIN? -

POLO: Jan Fethke /Jean Forge/, filma reĝisoro el Lódź, en la tagoj la 20-an ĝis 25-an de julio.

SVEDO: Arvid Holmström, kiun ni konas el lia pasintjara vizito al nia lando.

JAPANO: Kobo Abe, verkisto, el Tokio.

POLO: Mieszyslaw Rydlewski, Lódź 19, Traktorowa 154.

MEKSIKANOJ: geamikoj de s-anino C. de Guerra, el Mexico-Urbo.

NORVEGO: O. Thormodsen, prezidanto de EK MARA VENTO en Haugesund.

HUNGARO: Csánár, Gyula kun edzino el Budapest.

POLO: J. Uspienski el Varsovio.

Ve dnech 10. srpna až 5. září navštíví Československo bulharský esperantista, vědecký pracovník – filosof Vasil Čočov. Pokud by naše kluby měly zájem o návštěvu tohoto soudruha a ev. o jeho přednášku o Bulharsku a jeho kultuře, nechtě se laskavě obrátit na Dr. Jaromíra Jermáře, Jabloňová 23, Praha 10.

Konata sveda samideanino Anna Alamo – Sandgren, bone konata al tre multaj niaj legantoj, intencas viziti nian ŝtaton en la tagoj la 29-an de aŭgusto ĝis 18-a septembro, se ŝi ricevos enirpermeson, kiu estis al ŝi promesita. Lokoj, kiuj interesiĝas pri ŝia vizito, sciigu sian intencon al Josef Vítek, Jungmannova 24, Prah II., kiu aranĝos ŝian rondveturon.

NI RECENZAS...

PYGMALION EN ESPERANTO. La teatra kolektivo de nia Klubo „La Verda Ĉaro de Julio Baghy“ prezentis la 4-an de junio la faman Pygmalion de G. B. Shaw en esperanto! La „Malgranda sceno“, teatreto por 250 p., estis preskaŭ plena. La malfacilan rolon de F-ino Doolittle, komence strata florvendistino, poste edukatino de Prof. Higgins kaj fine virino kun homa digno vundita per ikono, ke ŝi estis nur objekto de eksperimento, brile ludis en ĉiuj tri aspektoj Eva Suchardová, kiu ankaŭ esperantigis la verkon /el ĉeĥa traduko/.

La edukanton de ŝia bona elparolado kaj de bonaj moroj, la memfindan, sed mem malbonmoran Prof. Higgins trafe prezentis Prav. Sádlo, ŝian sincere senmoralan patron lerte kaj senriproĉe nature ludis Antoni Seemann, kiu ankaŭ preparis kaj gvidis la prezentadon kiel reĝisoro. El la ceteraj plaĉis Eva Řiháčková en la rolo de komprenema patrino de la profesoro. La ceteraj roluloj estis: J. Ondráček /la seka observanto de la eksperimento kolonelo Pickering /, s-anino Nývltová /digna damo el bona societo/, El. Drapáková /ŝia filino Klara, kiu sukcese adaptis la novajn „societajn“ vortojn ĉe sia foriro/, s-anino Ynke Bartošíková /la digna kaj simpatia dommastrino de la profesoro/, Láďa Kynčl /gapulo/ kaj L. Rejthárková /servistino/. La neordinaran signifon de tiu ĉi plua entrepreno de la Verda Ĉaro mi vida sen du aferoj: Unue, estis farita provo uzi Esperanton argotan, kion E. Suchardová atingis per lingvo parolata nekultivite, kun malbona artikulado, kun eraroj akcentaj kaj gramatikaj /manko de akuzativo/. Krom multaj malfacilaj lokoj ŝi sukcesis en: „ili d'a Kynčl /gapulo/ kaj L. Rejthárková /servistino/. La neordinaran signifon de tiu ĉi plua entrepreno de la Verda Ĉaro mi vida sen du aferoj: Unue, estis farita provo uzi Esperanton argotan, kion E. Suchardová atingis per lingvo parolata nekultivite, kun malbona artikulado, kun eraroj akcentaj kaj gramatikaj /manko de akuzativo/. Krom multaj malfacilaj lokoj ŝi sukcesis en: „ili ŝin forkrakis“ kaj „ili forpinĉis ŝian ĉapelon“. La publiko tuj komprenante reagis per rido. Due: la reĝisoro Seemann sukcesis partoprenigi plurajn neprofesiajn aktorojn /kelkajn e lili estis eĉ novuloj sur la scenejo/ kaj direkti ilin tiel, ke ĉio fariĝis tute bone kunfandiĝinta. Estus dezirinde, ke Pygmalion estu prezentita ĉe iu tutŝtata okazo, por ke ankaŭ la ceteraj samideanoj povu ĝui la spriton de Shaw kaj la arton de niaj Verd-ĉar-anoj.

Hmd.

- - - -

La 5-a n-ro de NICA LITERATURA REVUO, kiu nin ĵus atingis, estas denove juveleto inter nia gazetaro. Ĝi estas dediĉita precipe al Brazilaj kaj sudamerikaj literaturaj talentoj. Ili ne estas malmultaj kaj ilia artisma nivelo, sen troigo, estas unuaranĝa. Fortimpresa kaj arte matura estas la poezio de Geraldo Mattos, kiu apartenas al novaj steloj de nia Parnaso. Lian Litvan freŝecon kaj idean dinamikecon oni deva agnoski ekz. en tia poemo Sangaj Epokoj, malgraŭ tio, ke la aŭtoro ne kapalis pozitive valorigi kaj valortaksi la dekadencan periodon de Kristanismo, kiel tion scipovas ekz. majstre nia Ŝulc en „Ŝtono kaj Doloro“.

Bonegaj estas originaloj kaj tradukoj poemaj de Sylla Chaves. Tre sagacan apologion de Esperanta alfabeto enhavas sprita artikolo de Ismael Gomez Braga „Pri ĉapeletoj“. Nin aparte ĝojigas publikigo de dueto de Marinjo kaj Jamo el Vendita Fianĉino de Smetana kaj oni relegante denove devas admiri la majstran tradukon de Dro Tomáš Pumpr. Min tamen pleje ravis la lastaj 4 paĝoj kun spritegaj difinoj de R. Schwartz kaj kun recenzo pri la libro „Koko krias Jam“ de F. Szilágyi, kies aŭtoro estas Ivo Rotkviĉ. La enhavo aprezanta la puran, superpasian arton de Szilágyi, kaj la unika ĝuiga lingvaĵo de Rotkviĉ, per kiu li scias neimiteble eldiri siajn klarajn kaj trafajn rimarkojn kaj konstatojn, estas esenco de misio de la bela, torĉa literatura revuo, kiun devus ĉiu esperantisto legadi kaj aboni.

Jiří Kořínek

Rim. de la redakcio: Aldone informo, ke la NICA LITERATURA REVUO estas abonebla ĉe s-ano Jar. Šustr, Dlouhá 10, Praha I

- - -

GEOGRAFIA REVUO, unua numero /34 paĝoj B5 formato/ tre agrable surprizis. Sperta redaktoro Tibor Sekelj aperigas ĝin kiel sendependan organon de la Internacia Geografa Asocio dum la UK en Jugoslavio fondita. Administranto: Nina Vidervol, Pražakova 12/III. I, Lujbljana. Abonprezo: unujarkolekto /minimum 4 kajeroj/ egalvaloro de unu usona dolaro /en ĈSR abonebla ĉe inĝ. Štefan Veselý, komitatano de IGA, Hviezdoslavova 2., Martin, kiu ankaŭ akceptas membroaliĝojn por IGA-jare egalvaloro de duondolaro/. Bela, multe ilustrita, lingve senriproĉa, sur bona papero presita revuo donas surprize streĉan kaj aventurplenan legaĵon al tiuj, kiuj interesiĝas pri malproksimaj landoj,

moroj de popoloj ktp. Aldonita unua listo de IGA-membroj enhavas tri nomojn el Ĉeĥoslovakio. Legi similan revuon estas ĝuo por ĉiu esperantisto.

-jelĉ-

NORDA PRISMO, la bela literatura, kultura kaj socia revuo ABONPAGEBLA en ĈSR pere de nia Klubo. Jara abonpago por 1956 estas Kčs 22.--. Pagu al kiu ajn nia konto, se vi hazarde havas hejme nian pagilon /estas la kontoj de la Klubo kaj tiuj de Ŝustr/ aŭ pagu al s-ano Ŝustr per poŝtmandato, aŭ petu de li pagilon. NE FORGESU dorsflanke de la pagilo noti por kia celo estas via pago Destinna. Ni atentigas, ke el nunjara kolekto vi ne ricevos numeron 1, kiu estas jam elĉerpita, sed rekompence ni sendos iun el la numeroj de pasinta jaro. Ni kredas, ke ŝatata nia membraro ĝoje akceptas ĉi tiun novan eblecon de legado de brila eksterlanda revuo kaj vaste uzos nian novan servon kiun ni proponas.

ESPERANTISTA KLUBO en BRNO, kiu ricevis iom pli frue la sendaĵoj de libro SINJORO TADEO el nia Klubo, pri kio ni ankaŭ informis en nia BULTENO n-ro 37., ricevis tiom da mendoj kaj pagod, ke ĝi tute ne povis kontentigi ĉiujn kiujn sendis monon kaj devis ĝin resendi. Esperantista Klubo en Brno petas pardonon de tiuj, kiujn ĝi ne plu povis kontentigi. Por pliaj mendoj turnu vin dum la samaj kondiĉoj al Esperantista Klubo en Praha, Dlouhá 10, Praha I. /Kčs 16 afrankite/.

--

LA FARAONO de B. Prus, en la traduko de KABE estas jam presata. Ni mendis grandan kvanton de tiu belega trivoluma kaj dissendos ĝin tuj, post kiam ni ĝin ricevos. Mendu ĝin tuj ĉe nia libroservo: Esp. Klubo en Praha, Dlouhá 10, Praha I.

Pola gazeto FILM, n-ro 25/1956, p. 12 en kvaronpaĝa artikolo parolas pri Jean Forge, aŭtoro de „Abismoj“, „Mr. Tot“, „Ireno, iru hejmen!“ ktp. La artikolo citas liajn verkojn en Esperanto kaj medias la esperantistech de nin vizitonta Jan Fethke – Jean Forge.

--

NOVAJ ESPERANTO-GLUMARKOJ. Okaze de la ĉi jara kursaro de Esperanto en Doksy eldonis Somera Kolgio de Esperato en Doksy serion da jubileaj glumarkoj por rememorigi jam la 10-jaran akziston de la Esperanto-Kolegio. Tiu ĉi jubilea serio laŭ la desegnoj de s-ano D. Bartošík, konsistas el tri specoj de glumarkoj: La ĉeĥlingva kaj esperanta estas propagandaj, la tria memorigos la 7-ajn Florajn Ludojn en Doksy. Krom la normalaj folioj po 25 glm., kiuj estas presitaj en kvar diversaj koloroj, aperis ankaŭ en malgranda kvanto speciala Memoriga foliem de nur 6 glm jubilea surskribo: 10 jaroj de SKED – 1946-1956.

Mendoj direkt al s-ano František Pytloun, Jungmannova 29, Poděbrady.

--

HODIAŬ ANKORAŬ SUBIĜAS LA SUNO SUPER ATLANTUJO, nova verko de dramatika arto de Vítězslav Nezval, nun sukcese prezentata en Nacia Teatro en Praha, estis tradukita en Esperanton de nia membro prof. Dro Stanislav Kamarýt.

--

NAJADO de Ant. Dvořák en Esperanto estis elsendita de Radio Praha la 12-an de junio 1956 en la programo „Kion vi plej ŝatas“. Kantis operkantistino de Nacia teatro en Praha Taubrová. La programvidantino menciis, ke temis pri kanto en Esperanto.

--

RADIO PRAHA preparas por septembro intervjuon kun la prezidanto de TKKE Josef Vítek pri Esperanto kaj la movado en Ĉeĥoslovakio /kurtondoj por eksterlando ruse, angle, france kaj germane, mezondo ĉeĥe por enlando/.

--

Informan artikolon pri Somera Kolegio de Esperanto en Doksy aperigis Třinecký Hutník /Třinec/, Strojár /Košice/, Jiskra /Třebíč/, Stráž lidu /Olomouc/, Lidová demokracie /Brno/, Nový proud /Otrokovice/.

--

Ĉu vi volas pasigi agrablan libertempon en esperantista entrepreno. Alfrédova chata /telefon Rýmařov 370/, p. Žďárský potok, p. Stará Ves u Rýmařova en Jeseníky proponas al vi siajn servojn por plene vin kontentigi. Alteco 1072m, lito 6 Kĉs, komuna loĝejo 5 Kĉs, manĝprezaro laŭ la III-a klaso restoracia. Hotelmastro Oldřich Ploch, absolvinto de SKED, ĝoje vin atendas. Ni rekomendas!

Praha-ek-1956-

39_40-07

BULTENO PRAHA 39-40-1956

- 7-

INTERNACIA ABELBREDISTA KONGRESO EN AŬSTRIO.

Aŭstria komitato por laŭcela propagando /Wien XV. Fűnfhaűsgasse 16-18/ informas pri la 16-a Internacia Kongreso de Abelkulturistoj /12-a ĝis 18-a aűgusto 1956/ kaj rekomendas ke la partoprenontaj fakuloj-esperantistoj influu la kongreskomitaton praktike uzi Esperanton aű rekomendu al lernado en fakaj rondoj.

Tiucele ni petas ĉiujn ĉs. Abelbrdistojn-esperantistojn anonci tuj al nia redakcio siajn adresojn kaj informi nin, ĉu en Knihovna Jednoty vĉelařů Praha II., Křemecova 8 ekzistas esperantistoj.

- - -

INTERESAS VIN...

UEA. Teritoria Oficejo de Universala Esperanto-Asocio sciigas: Jarlibro de UEA ne estis ankoraű dissendata, tial ne reklamaciuj ĝin. La dissendo okazos rekte el Nederlando, samkiel oni dissendas la revuon Ĉar plene elĉerpiĝis la provizo de unua nunjara numero de la revuo ESPERANTO, kelkaj aliĝintoj ne plu ricevis ĝin kaj la venontaj aliĝintoj kompreneble ne ricevos ĝin ankaűű. Pardonu afable! Kiu deziras, al tiu ni sendos anstataű la unua numero iun el la pasintjaraj numeroj dum ni havos ilin ankoraű. - Fariĝu membro de UEA! Jara kotizo: MA /membro abonanto/ Kĉs 50,--, MJ /membro Jarlibro/ Kĉs 20,--. Vian aliĝon skribu sur simplan poűtkarton kaj krom preciza adreso /laűeble mallonga/ diru al ni: jaron de via naskiĝo, jaron de via esperantiĝo kaj nomon de la Klubo, Rondo, Rondeto aű Grupo esperantista, en kiu vi estas membro. La aliĝon sendu al Jaroslav Ŝustr, Dlouhá 10, Praha I.

- - -

NI VIZITIS MOSKIVON. Redaktoro Géza Novotný, membro de nia Klubo ĵus revenis de sia vizito en Moskva. Li estis varme akceptita i. a. de k-do E. Bokarev kaj de lia filino en la loĝejo. Bokarev nun malsanas kaj kelkaj studentoj venis por helpi respondi amason da korespondaűoj. Nia membro ricevis de li jenajn informojn: en Moskva laboras nun ses esp. rondetoj. Ili kunvenas ĉiusemajne, lastfoje ĉeestis 50 esperantistoj. Asocio ankoraű ne estis fondita, ekzistas nur la Iniciata Grupo /IGSE/, sed alie ili laboras tute oficiale, de ĉie estas subtenataj kaj de neniuj malhelpataj. La fondo de asocio estas sur bona vojo. La universitata gazeto enhavas informojn pri esperanto. En la soveta gazetaro aperas artikoloj pri kaj por esperanto. En Leningrad okazas publikaj lecionoj pri esperanto kaj ĝi estas instruata ankaű en Moskva kaj Tula. La Radio ne elsendas en E., sed volonte uzas esperantistajn servojn. Estus utile, ke alilandanoj skribu al Radio Moskva petante renovigon de la esp. elsendoj. Bokarev aűtune vizitos ĈSR kaj eble la konferencon en Olomouc. La moskvaj esperantistoj danke akceptus taűgajn program/er/ojn, prezentitajn en niaj kluboj, por siaj kunvenoj. Ili jam ricevis tradukojn el armena lingvo. K-do Bokarev verkos por nia Bulteno artikolon pri la stato de E-movado en UdSSR. Liadire en la soveta esp.movado estas pli da oficialuloj ol ĉe ni, sed ni niavice montras ampleksan aktivecon /vi eű ludas „Pygmalion“ - li diris kun rekono/. K-do Bokarev eble ne koleretos, se ni malsekretigas, ke li mem faris el lado plaĉajn insignojn por esperantistoj. Kompense ni avizas lin, ke la dezirita „Bapto de caro Vladimír“ estas jam ekspedita. - Ni ĝojas je revido en Ĉeűslovakio, kara amiko!

- - -

UdSSR – TULA: La 19-an de aprilo okazis en regiona biblioteko de Lenin parolado de Dro de filozofiaj sciencoj E. A. Bokarev pűi „La problemoj de internacia helpa lingvo“. Ĉeestis plejparte gestudentaro, kvin malnovaj esperantistoj /ek de 1919/ kaj la administrantaro de Kulturdomo de urbo Tula, kiu estis organizanto de la parolado. La parolado estis zorgeme aűskultita kaj vekis grandan intereson.

Laŭ la sciigo de la ĝen. sekretario de UEA prof. Dro Ivo Lapenna certe partoprenos la UK en Kopenhago polaj delegitoj kaj profesoro Sevak el Erevan prelegos en la Somera Universitato. Ni estas certaj, ke ni ankaŭ partoprenos – venontjare post la kreo de nia Asocio, kiel asertis nin niaj kompetentaj instancoj. ---

EL HUNGARLANDO. Ĝojiga kaj solena vespero estis en la centra esperanto – kunvenejo en Budapest la 28-an de junio. Proksimume 60 ĉeestantoj el ĉiuj partoj de la hungara ĉefurbo amike akceptis komitatanon de TKKE el Praha s-anon Dron Jaromír Jermář, kiu vojaĝinte al la Landa Kongreso de Bulgara Esperanto Asocio en Sofia, unu tagon pasigis en Budapest. La ĝen. sekr. De la hungara Landa Esperanto Konsilantaro s-ano Lajos Márton salutis la karan gaston, kiu transdonis la saluton de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj, detale parolis pri la stato kaj progreso de la movado en Ĉeĥoslovakio jak pri la nunaj esperigaj klopodoj, pri la praha-a klubo, pri Verda Ĉaro de Julio Baghy, pri rilatoj kun Pollando kaj la Sovetunio. Li ankaŭ afable respondis al diversaj demandoj, inter ili de s-anoj Baghy kaj Balkányi. Antaŭ li oni starigis sur la tablon etan ĉeĥoslovakon flageton. Post tre aklama dankesprimado de la ĉeestantoj, la delgito de UEA en Budapest, s-ano L. Hattyár akompanis s-anon Jermář al la stacidomo por plua vojaĝo.

Dum lia ĉeesto okazis kun li ankaŭ oficiala priparolo pri kunlaboro inter TKKE kaj la hungara Landa E. Konsilantaro kaj oni interkonsentis, ke delegitoj de la HLEK partoprenos laŭeble ĉe la ĉeĥoslovaka Esperantista Landa konferenco en Olomouc.

La kunvenon ĉeestis ankaŭ en Budapest studentaj bulgara knabino kaj islanda universitatano. Du provincaj s-ano raportis pri la sukcesaj kursoj kaj aranĝoj en siaj koncernaj lokoj. Grava loka ĵurnalo en urbo Miskolc nun regule aperigas sciigojn pri Esperanto laŭ rekta alvoko de la tiea parti-sekretario. La Internacian Kongreson de Laborantaj Virinoj en Budapest partoprenis ankaŭ du alilandaj esperantistinoj, sed ne estis okazo oficiale renkonti ilin. Ŝajne ili ne umis la okazon por atentigi pri utilo de nia lingvo.

Post kelkajara paŭzo denove ekiris hungaraj al eksterlanda esperantista kongreso. Al la bulgara kongreso en Sofia vogaĝis 5 personoj, el ili 3 kun oficiala deĵor-pasporto, kiel delegitoj de la Landa Esperanto-Konsilantaro. Ilin budapeŝtaj esperantistoj amike adiaŭis ĉe la stacidomo.

Paŭlo Balkanyi, Budapest

I F E F – Internacia Fervoja Esperantista Federacio deĵoras en Amsterdam. IFEF havas fakmembrojn en multaj landoj de la mondo kaj ĝia celo estas unuigi ĉiujn fervojfakulojn-esperantistojn. Informojn postulu de landa delegito s-ano Jan Zemek, Palackého 23, Rumburk. Por ricevi respondon bonvolu aldoni afrankon!

KOMUNA KOLEKTIVA SLOVAKA-HUNGARA FILMKREADO. Bela ekzemplo de la amika kulturkunlaboro estas la nun pretiĝonta nova filmo el ankaŭ en Ĉeĥoslovakio konata hungara romano de Kálmán Mikszáth: „La pluvombrelo de Sankta Petro“.

La rakontita historio okazi sen slovakaj urboj kaj la filmon oni kune pretigas kun reĝisoroj, filmistoj kaj aktoroj el ambaŭ nacioj sur la originale priskribitaj lokoj. Oni samtempe faros la filmon en slovakaj kaj en hungaraj lingvoj, sed povas esti, ke la viran ĉefrolon ludos aktoro, kiu egale scias ambaŭ lingvojn kaj ludos en ambaŭ paralele farotaj filmprezentadoj. Reĝisoroj estas la slovakaj Vladimír Bahna kaj la hungaraj Imre Apáthi. La kunlaboron helpas la reciproka uzado de la plej taŭgaj instalaĵoj: oni preparos la filmon en hungara laboratorio, sed la muzikon faros slovakaj muzikistoj uzante lokajn popolajn muzik-motivojn. La muzikon oni surfilmigos en la studio de Praha, kiu estas pli laŭepoke ekipita, internajn partojn oni faro en budapeŝta studio.

La uzo de Esperanto ebligas, ke oni kreu tiajn filmojn, kiuj pro la enhavo interesas diversajn naciojn, aplikace nu runu lingvon kaj kiam la publiko jam scios la lingvon, oni ne bezonos fari apartajn kun diversaj aktoroj aŭ fabriki sinkronojn. Sed tio realigos nur en fora tempo. Nun ni ĝoju pri tiaj amikaj eblecoj.

P. B.

DEZIRAS KORESPONDI:

POLLANDO: s-ano Goluzin W. DEBNO, ul. Szava 1, woj. Szczecin /historio, ekonomio kaj lingvoscienco/,

VIETNAMIO:

s-anino Hoáng-thi Viñh, instruistino, giaovien Trung hoc Trungvuong HANOI

s-ano doan-quang Tinh, profesoro de Esperanto, Liceo Chu-van An. HANOI

s-ano Bui-bang Doan, oficiro, E 570, F: 330, BttlqdvN HANOI

komercantinoj:

Vu-bich Nga, Liceo Trung Vuong, klaso 2A, HANOI /18 jara/

Tran-le Thu, Liceo Trung Vuong, klaso 3C, HANOI /18 jara/

Trinh-yen Khanh, Liceo Trung Vuong, klaso 3C, HANOI /18 jara/

Ng-thi Dong-mai, Liceo Trung Vuong, klaso 3C, HANOI /18 jara/

Trinh-mai Oanh, Liceo Trung Vuong, klaso 3C, HANOI /18 jara/

Dinh-thi Luu, Liceo Trung Vuong, klaso 4C, HANOI /16 jara/

Tran-thi Nghia, Liceo Trung Vuong, klaso 4C, HANOI /17 jara/

Nguyen-thi Lẽ, Liceo Trung Vuong, klaso 4C, HANOI /17 jara/

Dâng-thi Nga, Liceo Trung Vuong, klaso 4C, HANOI /15 jara/

Nguyen-thi Yen, direktorino, Liceo Trung Vuong, HANOI /50 jara/

Nguyen-thi Chí, profesorino, Liceo Trung Vuong, HANOI /40 jara/

ITALUJO: Subtenu entuziasmon de 30 italaj junuloj – lernantoj de Metia deseglernejo kaj ekkorespondu kun ili per belaj poŝtkartoj, kiujn sendu a lilia lernejestro s-ano Ilvano MANIAS, Metia Deseglernejo, Esperanto-grupo AZZANO X /Udine/

JAPANUJO:

s-ano Kenzo YOSHIDA, Oosakaya, Tokio-Shiten, 6-1 Lida-machi, Chiyoda-ku TOKIO /40jara komizo/

s-ano Hideo OOTAKA c/o Kenzaburo Fukano, 27-2 Toyotama-kami, Nerima-Ku TOKIO /25jara laboristo/

ĈEĤOSLOVAKIO:

Novaj esperantisto jen Znojmo atendas korespondadproponojn el eksterlando. Adreso: s-ano Miloš Hruška, Bezručova 4, Znojmo /peto pri eksterlanda afabla represo/

s-ano František Zöld, STREDA n/Bodrogom, kr. Košice /20jara studento/, /peto pri eksterlanda afabla represo/

SUBTENEOJ KAJ DONACIOJ POR ELDONADO DE NIA BULTENO. Paperon siklostilan donace sendis Vítovec-Vodňany kaj Hromas-Hradec Králové. Mondonacoj: Pavlacký-Veselí nad Moravou Kčs 6,-, Cejnarová-Praha 6,-, Hadámek-Jakartovice 10,-, Chocholková-Praha 6,-, Kaplánek-Mariánské Lázně 2,-, 16,-, Dro Rathay-Praha 6,-, PhMr Jordán-Ružomberok 6,-, Havlík-Praha 26,-, Bohun-Nová Paka 30,-, Trombala-Bohumín 15,-, kanoniko Macek-Mikulov 15,-, Hrubeš-Pardubice 20,-, Horák-Prakovce 15,-, H. el J. 7,-, Hrneček-Ústí n.L. 20,-, Kyselý-Ostrava 20,-, Bordovský-Kroměříž 20,-, episkopo de Praha Dr. Ant. Eltschkner 50,-, akademiano, rektoro de teknika altlernejo prof. Dro Inĝ. Ježdík-Praha 26,-, Strejc-Praha 6,-, Kočvara-Ostrava 10,-, Vyhnal-Praha 6,-, Fürstová-Turnov 6,-, Bílý-Praha 6,-, Dryák-Praha 6,-, Novák-Bráník 6,-, Severa-Suchdol 10,-, Mikušová-Karlovice 10,-, J.E.S.-Praha 20,-, Drino Šaturová Bratislava 20,-, Večeřová-Praha 6,-, nacia artisto Martin Benka-Martin 30,-, Pytloun-

Poděbrady 16,-, ROH-Svaz zaměstnanců železnic Z.V. Správa Ostravské Dráhy Olomouc 30,-,
Cunderka –Gottwaldov 10,-.

Elkoran dankon al ĉiuj!

Esperantista Klubo en Praha

- - -

Dum la regiona konferenco en Poděbrady estis kolektita ,monsumo de Kčs 276,- por ebligi al blindaj
novsamideanoj partoprenon en la Somera Esp. Tendaro de Junularo en Žimrovice. S-ano Mařík, TKKE-
estro por Junularo kore dankas al ĉiuj donacintoj!

- - -

Laŭbezone eldonas ESPERANTISTA KLUBO ĉe Osvětová beseda en Praha 2.

Koresponda adreso: Jaroslav Šustr, Dlouhá tř. 10, Praha I.

Respondecas pri la enhavo: Josef Vitek, Jungmannova 24/1, Praha II.

Redakciaj telefonoj: Šustr 63 464, Vitek23 83 23

TKKE INFORMAS

N-ro 6. Julio-Aŭgusto 1956

Aperas laŭbezone.

MINISTERSTVO KULTURY

Číslo: sine.

Praha, dne 15. června 1956

Ministerstvo kultury, správa pro věci osvěty, potvrzuje, že Celostátní esperantský sbor, reprezentovaný soudruhem Josefem Vítkem jako předsedou, je oprávněn na základě jednání o úpravě poměrů v esperantském hnutí provádět veškeré přípravné práce potřebné k řešení tohoto problému.

vedoucí správy pro věci osvěty:

Ant. Richter, v. r.

Ministerio de kulturo, administrejo por popolklerigo konfirmas, ke la Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista, reprezentanta de k-do Josef Vítke kiel prezidanto, estas rajtigita baze de la traktadoj pri normaligo de esp. movado fari ĉiujn preparlaborojn por solvi la problemon.

gvidanto de la administrejo por popolklerigo

Ant. Richter, p. m.

Oficiala sciigo de la preparkomitato de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio /TKKE/:

TUTŜTATA KONFERENCO
DE ĈEĤOSLOVAKAJ ESPERANTISTOJ

Okazos la 20-an kaj 21-an de oktobro 1956 en Olomouc en salonego de Julius Fučík /est. Reduta/. Temo: Fondo de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio. Antaŭ la konferenco sabatvespere Arta vespero. Partoprenos oficialaj reprezentantoj kaj eksterlandaj delegitoj. Por faciigi la plej grandan partoprenon de ĉs. esperantistko estos fervojrabato. Jam nun estas necese provizore anonci sian partopreon al s-ano J. Karhan, Na hradě 2, Olomouc. La preparkomitato tiel havos supervidon pri tranokto, manĝoservo kaj fervojrabato. En septembro estos anoncita preciza programo, kiun fiksos la komitatanoj de TKKE dum sia kunveno en Doksy.

Preparkomitato de ĈEA /TKKE/ kunvokas por dimanĉo la 22-an de julio ĉiujn komitatanojn en Doksy por pridiskuti aktualajn problemojn de ĉs. esperantismo. Komenco je la 9-a horo en la lernejo de Somera Esperanto-Kolegio. Antaŭvespere en la sama ejo je la 20-a horo preparkunsido de la jam alvenintaj komitatanoj. Anoj de la komitato de TKKE konsideru via devo partopreni la gravan preparkonferencon, ĉar komuna estas nia respondec!

Josef Kožený, gvidanto
de organiza sekcio

Josef Vítke,
prezidanto

Milan Rudolf,
sekretario

T R I L E T E R O J

Pri grava ŝanĝo de sinteno de supera scienca institucio ĉeĥoslovaka rilate Esperanton atestas tri leteroj interŝanĝitaj inter la Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista kaj la Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj. Pro la graveco kaj intereseco de la leteroj ni publikigas ilin nekurtigite:

Prago, la 7an de marto 1956

Al Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj,
Kabineto por moderna filologio,
P r a h a 2 - Nové Město, Karlovo nám. 6.

Estimataj kamaradoj,

en lasta tempo okazis kelkaj gravaj eventoj en la mondo, kiuj koncernas Esperanto-movadon per maniero en historio senprecedenca. Al ili apartenas precipe aprobe de la Esperanta peticio /kiun parenteze, subskribis ankaŭ nia prezidento A. Zápotocký/ post batala baloto en UNESKO en decembro 1954 kaj kiu signifas agnoskon por Esperanto sur plej vasta interracia formo, enkondukon de Esperanto en lernejojn en iuj okcident-eŭropaj ŝtatoj kaj en Jugoslavio, kaj fine unua apliko de Esperanto en internacia diplomatia rilatado fare de V. Molotov kun la Japana nacia komitato por restarigo de normalaj rilatoj kun Sovetio kaj Popola Ĉinio en januaro ĉi-jara.

/La letero estis forsendita antaŭ la demento de tiu miskomprena sciigo, rim. de la tradukanto/.

Konsekvence de ĉi tiuj eventoj okazis nekutima ekvigliĝo de intereso pri Esperanto ankaŭ en ĉiuj popol-demokratiaj landoj kaj en Soveta Unio, kaj nome same en vastaj popol-masoj, kiel en science rondoj. En Sovet-Unio, en kiu sole el ŝtatoj de la socialista ŝtataro, ne ekzistis Esperanta organizaĵo, estis kreita prepara komitato por fondo de Esperanta organizo en la kadro de la Akademio de Sciencoj de USSR, en kiu krom aliaj estas ekz. famaj lingvistoj membro-korespondanto B. Serebrennikov, kand. de filolog. sciencoj E. Bokarev, redaktoro de la gazeto Voprosy jazykoznanija. La Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio, kiu apartenis al unu el la plej fortaj en la mondo, estis en la pasintaj jaroj forte paralizita de koncepto, ke propagandado kaj lernado de Esperanto povus signifi aniĝon al kosmopolitismo. Siavice komencas nun en la okcidento aŭdiĝi vpoj, ke la subteno al Esperanto fare de socialistaj ŝtatoj estas parto de la soveta diplomatia ofensivo direktata kontraŭ la prestiĝo de la angla lingvo.

En tiu ĉi malsimpla situacio ni turnas nin al nia science publiko, ke ĝi dediĉu sian atenton al problemeco de Internacia Lingvo laŭ ĉiuj aspektoj /filozofia, lingvistika kaj socia/, kiel nun okazas en Sovet-unio kaj ne subtaksu gravecon de tiu ĉi problemo, kiel okazadis antaŭe. Bedaŭrinde ne ekzistas pli granda diletantismo, ol ĝuste ĉe la problemo de Internacia Lingvo, malgraŭ ke ĝuste la problemo de Lingvo Internacia estas ligita kun nomoj de elstaraj filozofoj-logikistoj kiel estas Couturat, Peano, lingvistoj kiel Jespersen, Saussure, Meillet, kaj fine eĉ kun nomoj de gloraj verkistoj-humanistoj, kiel estas Barbusse, Roland, Gorkij kaj aliaj.

Por almenaŭ parte helpi klarigi ĉi problemojn, ni permesis al ni turni nin al vi kiel al kompetenta scienca organo de nia plej supera scienca institucio ĈSAS, ke vi bonvolu al ni sciigi

a/ ĉu vi konsideras problemon de internacia lingvo grava kaj utila,

b/ ĉu vi opinias, ke povas ekzisti obstoj kontraŭ uzado de Internacia Lingvo kiel helpa interkomprenilo el vidpunktoj filozofia, filologia kaj socia.

La opinio de plej supera science institucio en ĈSR estas por nia plua laboro tre grava, tial pardonu, estimataj kamaradoj, ke ni vin petas pri klarigo de la suprecititaj demandoj.

Ĉefine ni konigas, ke analogan leteron ni samtempe sendas al la Katedro de dialektika kaj historia materialismo kaj al Katedro de Lingvoj de la Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj.

Kun kamaradaj salutoj

Josef Vítek, prezidanto.

ĈEĤOSLOVAKA AKADEMIO DE SCIENCOJ – KATEDRO DE DIALEKTIKA KAJ HISTORIA MATERIALISMO,
Praha II, Pštrossova ul. 23

Prago la 17an de marto 1956

Al Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista, Praha II, Jungmannova 24.

Estimataj kamaradoj,

Ni dankas al vi por via letero de la 7a de marto k.j., en kiu vi turnas vin al ni kun kelkaj demandoj koncernantaj problemecon de internacia lingvo.

Ni konfesas, ke viaj demandoj nin trafis nepreparitaj: eĉ se ni okupiĝas per iuj filozofiaj problemoj de lingvo kaj eĉ se ni plene konsentas kun tio, ke demandoj, kiujn vi prezentas, meritas plenan atenton de nia scienca publiko, tamen nur niaj konoj tiurilataj estas tre malgrandaj. Malgraŭ tio ni trastudis kelkajn materialojn, kiuj estas je nia dispono, konatiĝis kun opinioj de pluraj science fakuloj kaj prizorgis al ni informojn pri la nuntempa situacio de la internaci-lingva movado. Surbaze de tiuj ĉi materialoj ni faris al ni certan – eĉ se tre malkompletan – bildon pri tiu ĉi problemeco kaj ni premas al ni komuniki al vi niajn opiniojn.

Estas karakterize, ke apud la lingvistoj, kiujn vi citas, okupiĝis per la problemo de internacia lingvo ankaŭ multaj filozofoj. En la unua etapo, en la periodo de renesanco kaj ekrego de progresema burĝaro, estas strebo de filozofoj elkrei internacian lingvon utopia klopodo transponti lingvajn obstaklojn, kiuj ekestis post malapero de la latino kiel universala interkomprenilo kaj kun apero de nacia konsciigo de konstituiĝantaj nacioj. Al tiaj eksperimentoj apartenas la utopia lingvo de Thomas Mor, la projekto de hispana filozofo-logikisto Vives, kaj ĉe ni poste la projekto de internacia lingvo de Komenský en Panglottia, la unua kompleta sistemo de internacia lingvo en la mondo entute. Laŭ spirito de tiu ĉi utopiismo poste daŭrigas ankaŭ la pli malfruaj projektoj de interlingvo de utopiaj socialistoj Cabet kaj Fourier. Kun disvolviĝo de la moderna logiko turnas la filozofoj sian atenton al la problemo de logika strukturo de lingvo kaj provas trovi akordon inter la logika kaj gramatika strukturo de lingvo. Idealan akordon de logiko kaj gramatiko ili poste strebas enkorpiigi en artefaria lingvo, kiu devus havi karakteron de internacia interkomprenilo /ekz. Descartes, Leibniz, en la moderna tempo Oswald kaj precipe la logikistoj Couturat kaj la matematika logicisto Peano kaj la lingvosciencistoj Jespersen, Baudoin de Courtenay, Meillet k. a./. Ĉe l'fino de la pasinta jarcento oni transiras de utopiaj projektoj de internacia lingvo al praktika realigo. Ekestas Volapük kaj post ĝia malsukceso Esperanto, kiu eldefendis al si ĝis nuna tempo preskaŭ monopolan pozicion de internacia lingvo eĉ kontraŭ provoj pri ĝia reformo aŭ anstataŭigo per aliaj projektoj. La sukceso de Esperanto ĉe fino de la pasinta jarcento estis konduita ĉefe per tio, ke nun transiro de naciaj merkatoj al merkato internacia neordinare plivastiĝis la interrilato inter unuopaj nacioj kaj la bezono de lingva perilo; kaj do estas karakterizo, ke Esperanto estas subtenata ne nur de la burĝaro, signifhavaj industriistoj kaj komercistoj, sed ĝi samtempe disvastiĝas kiel simpla interkomprenilo inter la laboristaro de diversaj nacioj, ĉefe per la socialdemokrataj organizaĵoj, post la unua mondmilito ankaŭ per la komunistaj organizoj /De tie fontas simpatioj al Esperanto ĉe eminentaj verkistoj kaj aktivuloj en la laborista movado, kiel estas la literaturistoj, kiujn vi citas – Gorkij, Roland, Barbusse – kaj fine ankaŭ ĉe ni ekz. S. K. Neumann kaj Chalupecký, la organizinto de la unua spartakiado k. a./. Post la dua mondmilito la nova bezono de proksimiĝo kaj interkompreno inter la popoloj elvokis evidence revivigon de klopodoj pri internacia lingvo, kiuj kulminis per akcepto de la Esperanta PETicio en UNESKO en j. 1954, kontraŭ kiu, kio estas karakteriza, stariĝis ĉefe imperialismaj ŝtatoj en la okcidento.

Ni opinias, ke estas tre ĝuste, ke vi montras al plura aspekto de problemeco de internacia lingvo, nome al ĝia aspekto filozofia, lingva kaj socia. Ĉefan mankonde la ĝisnunaj studoj pri la internacia lingvo ni vidas indike en

Praha-ek-1956-39_40-13

BULTENO PRAHA 39-40-1956

- 13 -

TKKE INFORMAS 6.

Tio, ke ili akcentas nur la Litvan facon kaj forgesas la ceterajn. Ĝi estas kaŭzita cetere de tio, ke niaj sciencistoj dediĉas malmultan atenton al la lingvo aŭ ilo de komunikado kaj informado; ĉi tie kunlaboro de logikistoj, lingvistoj, sociologoj kaj teknikistoj povus alporti multajn valorajn sportojn kaj helpus ankaŭ klarigi la problemon de internacia lingvo. En konsekvenco de la batalo kontraŭ la konvencionalisma konceptado de lingvo oni ofte proteratentas ĝian konvencian flankon entute kaj lingvo estas konceptata **nur** kiel manifestiĝo de psiko kaj de historia evoluo. Sed la trotaksado de tiu ĉi flanko de lingvo signifas ĝian mitiĝon kaj diigon, forŝiron de ĝia baza funkcio, nome de funkcio komunika. Cetere ankaŭ la dua flanko de lingvo, ĝia rilato al nacio, estas pli komplika, ol oni ĝis nun eksplikadis: sukcesaj provoj enkonduki lingvojn artefakte renovigitajn aŭ arte finfaritajn, kiujn ĝis nun neniu nacio parolis /kiel estas Ivrit en Izraelo aŭ la indonezia lingvo en Indonezio/ kiel literaturajn lingvojn de konstituiĝantaj nacioj, montris al novaj aspektoj de rilato inter nacio kaj lingvo, neceson revizii iujn ĝisnunajn konceptojn kaj samtempe ankaŭ konfirmas iujn teoriojn, el kiuj venas la projekto de internacia lingvo. Cetere ni opinias, ke aliĝo /pli korekte reaniĝo/ de Ĉeĥoslovakio al International Standardizing Organisation kaj ĝia lingva sekcio, kiel estis sciigite en Bulteno de Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj pasintjare, starigos ankaŭ niajn filologiajn laborantojn antaŭ kelkajn problemojn de internacia lingva konvencio kaj per tio ankaŭ antaŭ problemaron, proksiman al problemo de Lingvo Internacia. /Laŭ nia scio, tiu ĉi organizaĵo, kies fondinto estas ankaŭ Sovet-unio, eldonas siajn terminologiajn materialojn ankaŭ en Esperanto./

Kiom rilatas objekton, ke la Internacia Lingvo povus esti disvastiganto de kosmopolitismo, do estas necese emfazi memkompreneblan fakton, ke **ĉiu** lingvo povas esti disvastiganto de ĉiuj ajn politikaj ideologioj kaj konceptoj. Ja alia estas problemo de lingva politiko; sed ankaŭ ĉi-kaze necesas akcenti, ke Lingva politiko kiel instrumento de klasbatalo dependas de la donita situacio politika kaj ekonomia kaj ne de la lingva strukturo.

Pro tiuj motivoj ni opinias, eĉ se bedaŭrinde surbaze de nur nekompletuj informoj, ke ne devas esti principaj obstoj el filozofia vidpunkto kontraŭ ebleco de internacia lingvo, eĉ se estas al ni klare, ke tiu ĉi problemo estas tro malsimpla kaj implicas pli vastan sferon da problemoj, ne povas esti elĉerpita nur sur la bazo de nia nekompleta studo. Kiom koncernas la propran strukturon de internacia lingvo, ĝian leksikologian kaj gramatikan sintenon, ĉirilate ni opinias, ke al tiu ĉi problemo povas doni respondon nur la fakuloj-filologoj; solvi ĉi tiun problemon estas super niaj ebloj kaj scioj. Ni deziras al vi multajn sukcesojn en via laboro kaj restas kun kamarada saluto

Doc. Dro Ladislav T o n d l ,
estro de la katedro

ĈSAS – Kabineto por la moderna filologio, Praha I., Liliová 13.

KMF/1.09-558/Pol/D.

Prago, la 22an de marto 1956.

La problemo de internacia interkomprena lingvo kaj per tio ankaŭ la problemo de Esperanto estas problemo tre malsimpla laŭ tio, el kiu vidpunkto ni ĝin prijuĝas, eĉ se ni limiĝos en niaj rimarkoj nur al lingvosciencia sfero kaj lasos flanke la ceterajn aspektojn de tiu problemo.

Estas certa, ke kreo de artefarita interkomprena lingvo internacia estis delonge revo kaj parte ankaŭ praktika bezono por granda nombro da homoj devantaj interrilati reciproka. Per la kreo de tia lingvo ni atingus signifan bazon ebligantan interproksimiĝi ne nur al unuopuloj, sed eĉ al tutaj nacioj. Laŭ tiu flanko do kompreneble ne povas ekzisti obstoj kontraŭ kiu ajn artefarita interkomprena helplingvo,

kaj per tio ankaŭ ne kontraŭ Esperanto. Sed se ni volas prijuĝi la Internacian Lingvon de tiu speco el vidpunkto pure lingvista kaj faka, ni kontraŭpuŝas al vico da malfacilaĵoj. Volonte ni informuj vin pri kelkaj, por ke vi vidu, ke ankaŭ ni el vidpunkto pure lingvosciencia pri tiu problemo okupiĝas. Laŭ tiu flanko ni povas priore prikonsideri la internacian lingvon kaj surbaze de tiuj konsideroj esplori ankaŭ Esperanton, ĝis kia grado ĝi respondas al la postuloj teorie fiksitaj.

Praha-ek-1956-39_40-14

BULTENO PRAHA 39-40-1956

- 14 -

TKKE INFORMAS 6.

Ideala nome estus, ke la artefarita helplingvo interkomprena registru en siatipo tiajn ecojn, kiuj respondus al strukturaj ebloj de ĉiuj lingvoj en la mondo, kaj tial estus indiferece por ĉiuj akcepteblaj. Alie dirite, laŭ tiu flanko la artefarita helplingvo devus esti difinita per tio, ke ĝi estas komuna al ĉiuj lingvoj en la mondo. Sed la ekzistantaj ĉefaj lingvotipoj ne estas transigeblaj per tiu ĉi maniero al ia komuna denominatoro kaj pro tio tipologia karaktereco de ĉiu artefarita lingvo estas senescepte problema kaj estas devigata alkonformiĝi al tiu aŭ alia lingva tipo. Per tio ja por anoj de aliaj lingvotipoj regado de kiu ajn artefarita lingvo fariĝas tre malfacila jak estas facila por certaj grupoj. Se ni ekzemple en la verban sistemon de tia artefarita lingvo enkondukus verbaspektajn kontrastojn uzatajn en la struktura tipo de lingvoj slavaj, estus ilia regado ebla nur ĉe la anoj de slavaj lingvoj, event. ĉe anoj de ankoraŭ kelkaj pluaj lingvotipoj, ĉe kiuj ni renkontiĝas en la verba sistemo kun aspekta kontrasto. Alie ni kontraŭpuŝus al nesupereblaj malfacilaĵoj. Simile estas tre malfacile fiksi ankaŭ la fonologian strukturon de tia arta lingvo. Estas nome nur tre malmultaj fonologiaj kontrastoj kiuj estas komunaj por ĉiuj lingvoj en la mondo. Per tio la fonologia inventuro de tia artlingvo estus tre malriĉigita kaj eĉ vortkreado ni hustadus problemon, kiel kaj de kie ni ĉerpu novajn vortojn. Ĉi tie estas du speco vojo: aŭ kreadi vortojn nemotivite kaj tute hazarde sen rilato al la ĝisnunaj lingvoj aŭ alrigardi la internaciajn vortojn kaj lingvogrupojn aŭ lingvojn altgrade disvastigitajn en la mondo. Sed ankaŭ tiel estus la malfaciloj grandaj, ĉar teorie akceptebla fonologia sistemo devigus nin al diversaj manieroj de pritrancado kaj adaptado de vortunuoj. Pli detala ekzamenado de fonologia strukturo de plej disvastigitaj lingvoj montrus al ni, ke ĝi ne taŭgas por la relative malriĉa inventuro de fonologiaj kontrastoj de artefarita lingvo kaj poste eĉ ne eblus de tie la vortojn prunteprenadi. Ni devus la vortojn nove krei kaj per tio ja fariĝus neniel iliaj kompreneble kaj lerneble. Ĉi tiuj teoriaj konsideroj montras, kiel la problemo de artefarita helplingvo estas por lingvisto problemo tre delikata kaj malfacila, se ĝi devus esti priregita tiel, kiel postuluĝis ĝia teoria karaktero. Ĉe tio ne eblas forgesi, ke lingvo kiel krepo de la socio, estas en neniu sia formo artefarita kaj rigore lingviste konstruata sistemo de komunikaj rimedoj, kion klopodas ĉiuj aŭtoroj de artefaritaj internaciaj helplingvoj. La lingvoj en ĉiu sia rimedo kaj ĉiu sia funkcio estas ligata al komunibezonoj de la scio, resp. nacio, kiu ĝin uzadas. Laŭ tiu trajto mankas al la artlingvoj tiu ĉi necesa bazo. Teorie oni povas tion supervenki kaj flanko lasi, ke ĉiu lingvo estas per sia socia bazo ligita al certa tipo de pensado rezultanta el ekonomiaj, kulturaj kaj socialaj kondiĉoj. Tiurilate la strukturo de plejparto de helplingvoj kaj do ankaŭ de Esperanto konvent pli malpli al struktura tipo de certa eŭropa lingvogrupo, antaŭĉio de okcidenteŭropaj lingvoj latinidaj. El tiu vidpunkto sekve estas Esperanto fremda al ĉiuj lingvoj orienteŭropaj kaj ceteraj. Tio nature malfaciligas, kiel ni aludis, teorion kaj praktikan priregon de la gramatika konstruo de Esperanto fare de anoj de aliaj lingvoj el de lingvoj latinidaj aŭ lingvoj tipologie similaj Same estas ankaŭ pri la leksikona provizo. Ankaŭ ĝi konvenas nur al certa, eĉ se ne malgranda lingvogrupo.

La anoj de la ceteraj lingvoj devas sekve Esperanton lerni kiel ĉiun fremdlingvon kun ĉiuj avantaĝoj kaj malavantaĝoj, kiuj el tio rezultas. La samo validas ankaŭ pri la fonologia strukturo de Esperanto. Eĉ se ĝi estas relative simpla, ĝi ne estas universalaj kaj la kelkiu nacio faras malfacilaĵojn. Tio ne signifas, ke la teoria lingvoscienco nepre starigus sin negative al Esperanto. Kiel teoria problemo estas Esperanto same kiel ĉiu alia artefarita helplingvo problemo tre interesa kaj en tempo, kiam estas necesa interproksimiĝo de ĉiuj homoj en la mondo, eĉ problemo aktuala.

Sed la lingvoscienco dume ne scipovas estri la teorian problemecon de artefarita helplingvo tiel, ke ĝi laŭ vidpunkto teoria kaj poste ankaŭ praktika ebligus krei tian sistemon, kiu estus akceptebla sen grandaj malfacilaĵoj por ĉiuj aŭ almenaŭ plejmulto da homoj en la mondo.

Sed la problemon de Esperanto ni ne volas perdi el la evidento kaj ĝis kiom ĝin ebligos al ni niaj labortaskoj, ni volus plue okupiĝi per ĝi.

Por Dro Václav P o l á k,
scienca sekretario

ĈSAS – Katedro de lingvoj, Praha II, Pštrossova 23.

384/56

Prago la 26an de marto 1956.

Respondo al demandletero de la 8a de marto 1956.

Estimataj kamaradoj, ni respondas vian demandon de la 8a de marto 1956. Anticipe ni devas vin atentigi, ke nia Katedro de Lingvoj ne estas la plej kompetenta lingva laborejo de ĈSAS por solido de teoriaj problemoj de modernaj lingvoj. Nia katedro okupiĝas per lingvoinstruo al aspirantoj jak science laborantoj de ĈSAS, plue por teoriaj problemoj koneksaj kun tiu ĉi instruo. Tion ni indikas por ĝusta pritakso de nia respondo.

La laborantoj de nia katedro opinias, ke vian unuan demandon, ĉu ni konsideras problemon de internacia lingvo kiel gravan kaj utilan, oni povas respondi jese. Ni opinias, ke ĉio, kio povas kontribui al firmigo de paco, estas grava kaj utila. Lingva interkompreno de homo jen la tuta mondo estas grava rimedo por atingo de tiu celo.

Rilate la duan demandon, ni opinias, ke el vidpunkto filologia ne povas esti obstoj kontraŭ Esperanto kiel h e l p a interkomprenilo. Ni estas nur ĝenerala konantaj Litvan strukturon de Esperanto. Sed ŝajnas al ni, ke Esperanto kiel artefarita lingvo, bazita vortare kaj gramatike sur strukturo de latinidaj lingvoj, ne estas same facila por anoj de nacioj, parolantaj per lingvoj fonoloie, vortare kaj gramatike diferencaj de latinidaj lingvoj aŭ pli ĝenerale lingvoj hindoeŭropaj. Kompare kun naciaj lingvoj, kiuj estas rezultuj de longa historia evoluo en strikta kuneco kun evoluo de pensado kaj kun historio de tiu aŭ jena nacio, devas Esperanto aŭ kiu ajn alia artlingvo malhavi lafajnan diferencigon leksikan-frazeologian kaj stilistikan, kiuj ebligas subtile diferencigitan pens-komunikadon. Tial ŝajnas al ni, ke en donita stato povas Esperanto servi efektive nur kiel h e l p a interkomprenilo. Plue ni opinias, ke al ĝenerala akcepto de Esperanto kiel internacia lingvo utilis certa laŭracia perfektigo en rilato al pli facila alproprigeblo por parolantoj de lingvoj kun malnajbara lingva strukturo, plue rilate pliriĉigon de esprimeblecoj.

Ĉi-kune ni ankoraŭ foje emfazas kaj samtempe ekskuzas nian nur ĝeneralan konon de Esperanto, ku al ni ne permesas, ke ni esprimiĝu pri tiuj problemoj pli kompetente kaj kun pli granda aŭtoritateco.

Kun kamaradaj salutoj

Dro Antonín H o f m a n ,
estro de la Katedro de lingvoj de ĈSAS.

Tradukis Jiří K o ř í n e k

SOMERAJ KURSOJ DE ESPERANTO EN P Ř Í B O R .

Závodní Klub Tatra Příbor – esperantský odbor /adr.: Ant. Satttek, Dvořákova 744 Příbor pořádá LETNÍ KURSY ESPERANTA Th. ČEJKY ve dnech 16.-30.7.1956.

Kursy budou míti dva běhy: 1. Pro začátečníky, 2. Pro pokročile a pro budoucí učitele esperanta.

Kursovne, ubytování a stravné Kčs 320,-. Ubytování bude v soukromí a společné. Přednášky se konají dopoledne. Volná odpoledne budou věnována krátkým vycházkám a výletům do blízkého

romantického okolí. Kdo chce poznati kraj Janáčkův, Palackého, Emila Zátopka, jistě neopomene zúčastnit se těchto kursů.

NIAJ-SALUTOJ-FLUGAS-AL-LA-UNIVERSALA-KONGRESO-DE-ESPERANTO-EN-KOPENHAGO-EN-BONA-
ESPERO-PRI-VENONTJARA-ANKAŬ-NIA-PARTOPRENO!

TKKE intencas starigi scienca sekcion, kies cele estus:

- a) per esperanto ebligi scienca laboron,
- b) science labori pri esperanto.

Tiu ĉi sekcio kunlaborus kun Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj kun aliaj esperantistaj kaj naciaj science institucioj.

Nur por nia registro ni bezonas:

1. nomojn kaj adresojn de ĉiuj esperantistaj sciencaj laboristoj /ankaŭ altlernejaj instruistoj, specialistoj, fakuloj/ en Ĉeĥoslovakio,
2. nomojn kaj adresojn de ĉiuj esperantistoj, kiuj science laboras en esperantologio /historio de esperanto, faka terminaro, bibliografio kaj simile/.

Nomojn kaj adresojn bonvolu sendi al Dro Jaromír Jermář, Jabloňová 23., Praha 10

- - - -

MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO.

JIHLAVA:

La 14-an de junio fondiĝis nova Esperantista Rondeto ĉe Krajský Dům Osvěty /Regiona domo de kulturo/. La unuan kunvenon ĉeestis 12 personoj. La kunvenoj okazos ĉiuĵaŭde je la 18-a horo en la Domo de kulturo, Žižkova 15. Sinceran gratulon kaj multajn korajn salutojn al tiu ĉi nova rondeto.

KARLOVY VARY:

Nova rondeto ĉe la Kulturdomo. Promesita estas klubejo kun propaganda fenestro kaj ceteraj propagandanguloj en ĉefaj stratoj de tiu ĉi mondfama banurbo. Aŭtuna kurso certe plialtigos la nombron de lokaj aktivuloj, kiujn gvidas s-ano Vladislav Horák, Stalingradská 37, Karlovy Vary. Respondo al demandletero de la 8a de marto 1956.

KOPŘIVNICE:

Kurso en la 2-a mezlernejo. Partoprenis 15 lernantoj. Gvidis s-ano Ant. Satek el Příbor. Esperanta rondeto de la nomita mezlernejo eldonis plaĉan poŝtkarton kun desegnaĵo pri famaj aŭtomobiloj de loka aŭtomobilejo, kaj teksto: „Kun rapida kaj moderna aŭtomobilo „Tatra“ Kopřivnice al tutmonda paco!“

PODĚBRADY:

La esperantista rondeto ĉe Distrikta popola biblioteko aranĝis la 3-an de junio sian unuan festenan laborkunvenon. Al tiu ĉi laborkunveno estis invitataj multaj gesamideanoj el plej diversaj lokoj. Anoj de la loka rondeto kaj la 67 gastoj el 25 lokoj kunvenis en festene dekorita salono de la restoracio „Bílá růže“. La laborkunveno gvidis s-ano Frant. Pytloun, pri la laboro de la rondeto parolis s-anoj Nozar kaj Chvosa. Sekvis prelegoj pri Esperanta movado en la mondo /s-ano Vítek/, pri la movado en Ĉeĥoslovakio /s-ano Kožený/, pri junulara movado /s-ano Mařík/. Kantajn kaj muzikajn enmetaĵojn prizorgis s-aninoj Vaněčková kaj Hledíková. Malferman poemon „Al la Majstro“ recitis s-anino Eli Urbanová. La festem laborkunveno, kiu signifis grandan fortigon por la nova kaj ankoraŭ malgranda rondeto estis finita per komuna tagmanĝo. Posttagmeze la gastoj trarigardis memorindaĵojn de la malnova urbo.

PRAKOVCE:

Kurson gvidas s-anoj Dušan Kostoln kaj Štefan Horák.

PŘÍBOR:

Grave kontribuis per sendo de bonaj verketoj infant por libro Infanoj de la Mondo, kiun eldonas japana eldonejo Hejbonŝa. Pri la afero atente zorgis instruisto A. Sattek, al kiu ni sincere dankas.

SPIŠSKÁ NOVÁ VES:

Esperantistoj en Spišská Nová Ves petskribis la lokan Doman de Kulturo pri novstarigo de esperantista rondeto. Kunvenoj en la Domo ĉiumerkrede je la 19-a horo. Estro de la rondeto s-ano Štefan Michalka. Sinceran gratulon!

SVITAVY: La urbo antaŭ nelonge festis sian 700-jaran daŭron. Esperantista rondeto ĉe la uzinklubo de nacia entrepreno Svitap grave kontribuis al tiu ĉi jubileo. Helpe de ili la urbestro ricevis gratulleterojn de esperantisto jel ĉiuj mondanguloj kaj decidis al ĉiu bondezirinto letere respondi en la nomo de la loĝantaro kaj aldoni donacojn de la urbo. Gravan rekonon al agemaj lokaj esperantistoj esprimis ankaŭ la taggazeto Rovnost /Brno/ la 3-an de julio en la artikolo „Pri la jubileo de Svitavy en eksterlando“. Ni sincere ĝojas kun niaj geamikoj en Svitavy kaj nun ilia gvidanto s-ano L. Rýznar.

TŘINEC:

Jam antaŭ la dua mondmilito sur la limmonto Ĉantoria en la regiono de Těšín kunvenadis ĉiujare esperantistoj el Ĉeĥoslovakio kaj Pollando por firmigi sian amikecon kaj interŝanĝi spertojn pri Esperanto. Tiu ĉi tradicio estis renovigita post la liberigo de ambaŭ landoj. Same okazis ankaŭ nunjare kaj kia ĝojo por ni ĉiuj estis bonvenigi proksimume 50 polajn gesamideanojn el Pola Czeszyn, Wisla, Stalingrad. Antaŭ la pilgrimo el Ĉantoria en la tagoj 4.-10.6. estis aranĝita prelegseminario, kiu sabatvespere finis per amuza programo, kiun ankaŭ partoprenis 16 polaj gesamideanoj TKKE reprezentis pluraj regionaj komitatanoj el regionoj Ostrava kaj Olomouc kaj s-ano Kožený, organiza sekciestro el Kutná Hora, kiu komisiite reprezentis ankaŭ la EK Praha. La tuta aranĝo en la kadro de la Uzina klubo de ferfabrikoj de V. Molotov en Třinec estis vere granda ĉiufanka sukceso por la nelacigebla s-anino A. Milatová kaj ceteraj ŝiaj kunlaborantoj, al kiuj ni kore dankas pro bone farita laboro por nia movado!

ZNOJMO:

Post kelkmonata kunlaboro de s-ano Miloš Hruška el Znojmo kun la sekretario de TKKE Miloš Rudolf la 13-an de junio ekfunkciis ĉe la Kulturdomo esperantista rondeto. Post belega antaŭ vespero, dum kiu prelegis Miloš Rudolf kaj estis prezentitaj arioj kaj duetoj el „Vendita fianĉino“ aliĝis 46 interesuloj, inter ili ankaŭ la direktorko de la KD k-do Karšulín al la nova rondeto. Kurs opor komencantoj, gvidata de s-ano Hruška, startis la 20-an de junio. En centro de la urbo estos propagandfenestro kaj distrikta popoliblioteko aĉetos E-literaturon kaj lernolibrojn por speciala fako de la biblioteko. La kulturdomo kaj la Biblioteko aranĝos ekspozicion. Ĉeĥoslovakaj kaj eksterlandaj rondetoj estas petataj pruntesendi taŭgan materialon por tiu ĉi ekspozicio. Sendu leterojn, poŝtkartojn, esp. ĵurnalojn, bultenojn ktp. La rondeto respondos ĉiun korespondaĵon! Adreso: s-ano Miloš Hruška, Bezručova 4, Znojmo. Planita laboro alportis siajn fruktojn en la naskiĝurbo de la sekretario de TKKE.

Pluraj gesamideanoj el Ĉeĥoslovakio nunjare vizitos Pollandon, tial ni vidas utila publikigi adresojn de lokaj filioj de Asocio de Esperantistoj en Pollando.

Warszawa: ul. Kozia 3 m. telef. 60133.

Wroclaw: ul. Dubois 3.

Kraków: ul. Floriańska 14.

Stalinogród: Wojwodzki Dom Kultury.

Lódz: ul. Vschodnia 74 /w lokalu Spoldz. im. Hibnera/

Poznań: ul. Mostowa 14 m. 37 /sam. J. Mielcarek/

Opole: ul. 1-go Maja 6a.

Olsztyn: Kortowo skr. poczt. 14 /Wyzsza Szkola Roln./

Bydgoszcz: Wojewodzki Dom Kultury.

Radom: ul. Zeromskiego 27, Ksiegarnia „Dom Ksiazki“.

Szczecin: ul. Jana Styki 8/2 sam. Mariakowski.

Białystok: sam. Lech Pietrowski,

Nowa Sól: sam. R. Sakowicz, ul. Parafialna 3.,

Lublin: sam. Konderak, ul. 1-go Maja 6/8

Cieplice-Zdroj: sam. Siemaszko, ul. Jagiellońska 29.,

Gizycko: sam. Skoczek, ul. Mazúrska 9 m. 17.

Toruń: sam. Piatkowski, ul. Konopnickiej 20.,
 Gdańsk: sam. Prof. J. Toszyski, ul. Grünwaldzka 6 /Wrzeszcz/,
 Bielsko-Biala: s-ano Mgr. Dydak Mieczyslaw, ul. Zywiecka 47 m. 8.

GRAVA ATENTIGO! Ĉiam pli ofte multiĝas artikoloj pri nia movado aŭ pri faroj de niaj esperantistoj en diversaj gazetoj ĉeĥoslovakaj. Pluraj geamikoj regule alsendas aĉeraĵojn el siaj regionoj, sed por preciza dokumentado estas necese havi kompletan reton. Dum la konferenco en Olomouc estis komisiitaj EK Brno kaj EK Praha kolekti ĉiun presmaterialon. Tial ni urĝe petas ĉiujn gesamideanojn regule sendi kompletajn gazetnumerojn al s-ano Josef Vondroušek, Botanická 31, Brno aŭ al s-ano Josef Forman, Madridská 22., Praha XIII., kiuj vere tre zorgeme prilaboras tiun ĉi dokumentan materialon.

Hispanaj gesamidanoj informas nin pri sia 17-a landa kongreso /25-29/7 en Barcelono. Ni sendas al ili niajn sincerajn salutojn kaj bondezirojn!

A upřimná slova na závěr:

Dobře si uvědomujeme, že naše služba esperantistům našeho státu je velmi nedokonalá a má celou řadu vážných nedostatků. Rádi bychom se s vámi radili o všech důležitých opatřeních, rádi se zamýšlíme nad vašimi dopisy a radujeme se z úspěchů, ale hledáme také cesty k odstranění neúspěchů. Odpovídáme vám podle svých nejlepších možností, které ne vždy jsou uspokojivé. Prosíme vás, abyste si uvědomili, že hlavními nedostatky jsou malé finanční možnosti, jimiž TKKE operuje, omezený rozsah TKKE INFORMAS a pracovní povinnosti všech členů výboru TKKE. Přesto věříme, že na připravované konferenci v Olomouci vám budeme moci podati nemalý přehled o dosud vykonané práci. Jako nejdůležitější zprávu považujeme za vhodné vás informovat, že na základě osobního jednání členů výboru TKKE sam. Miloše Rudolfa a později Dr. Jaromíra Jermáře a Josefa Vítka v Praze, sam. Eduarda Tvarožka a Pavla Rosy v Bratislavě, ÚV KSČ pověřil ministerstvo kultury, aby ve spolupráci s TKKE urychleně připravilo vše nutné pro vytvoření celostátní organizace esperantistů v ČSR. Řídíce se pokyny ÚV KSČ a směrnicemi ministerstva kultury, učinili jsme tato potřebná opatření:

1. vypracovali osnovu stanov Československého esperantského svazu /Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio/ - Dr. Tomáš Pumpr. Připomínové řízení: Dr. Jaromír Jermář, Dr. Stanislav Kamarýt, /Rudolf Hromada/, prof. Josef Kožený, Jaroslav Mařík, Pavol Rosa, Miloš Rudolf, /Dr. Ľudovít Izák, Ing. Štefan Veselý/, Jaroslav Šustr, Eduard V. Tvarožek, Josef Vítek, Josef Vondroušek. Stanovy byly zadány k schvalovacímu řízení dne 25. června 1956 s tím, že vejdou v platnost na celostátní konferenci čl. Esperantistů v Olomouci ve dnech 20.-21. října 1956.
2. přihlásili jsme se k záznamu do plánu pro rok 1957 vydávání tiskového orgánu Československého esperantského svazu /paralelně na Slovensku/.
3. požádali jsme st. Nakladatelství o zařazení do plánu v roce 1957:

a/ tisk učebnice /Kilian, přepracované vydání, recenze Vondroušek, Bartošik/

b/ tisk oboustranného slovníku /Filip, rozšířené II. Vydání, recenze Kamarýt/

Obdobně si počínají slovenští samidání, kteří /Ed. Tvarožek/ vydali provolání ke všem slovenským esperantistům, aby znovu po dohodě s Osvětovými domy zakládali kroužky a v místech, kde jsou aspoň 3 esperantisté, zakládali akční výbory pro založení kroužku. Slovenští samideáni věří, že do olomoucké konference bude na Slovensku hnutí plně ve všech místech obnoveno. V tomto směru jsou nám dobrým příkladem a je nutno, abychom je následovali v místech, kde ještě esperantisté nejsou sjednoceni a nevytvořili si vhodné pracovní podmínky v rámci osvětových zařízení. O založení kroužku nebo obnovu činnosti nám pošlete zprávu /sam. Miloš Rudolf, Wanklova 14, Olomouc

nebo Josef Kožený, Kutná Hora/. Agituje pro největší účast v Olomouci, abychom takto dokumentovali své nejlepší úmysly vůči naší republice a svou nezlomnou vůli po míru a přátelském spojení národů celého světa!

Josef Vítka, předseda, Ed. V. Tvarožek, místopředseda, Miloš Rudolf, jednatel
